

Someraj esperanto-aranĝoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 468, 1972.09.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni konstatis kun pluraj el niaj geaŭdantoj, ke dufoje nia tagmeza prelego estis forigita. Regula aŭdanto, sinjoro Daniel Mühlemann en Brugg, Svislando, informiĝis : ĉu la forigo estas ŝuldata al politika enhavo. Tute ne ! Ĝi estis ŝuldata al la politikaj eventoj en la mondo. Antaŭ nia programo troviĝas raporto pri la aktualaj. Tiu raporto estis pli longa ol kutime, kaj teknike ne plu restis sufiĉe da tempo por niaj prelegoj, kiuj eble estis iomete tro longaj. Estontece ni provos ne paroli pli longe ol la ses minutoj, kiujn ni ricevadas.

A.- La monatoj julio kaj aŭgusto, kiel kutime, sumigas impresigan liston de esperanto-kongresoj. Jen la listo de la ĉefaj : nia junularo grupiĝis en Torun, Pollando, la SAT-membroj en Kuopio, Finnlando, la festival-ŝatantoj en Budapeŝto kaj Vieno. Okazis kursoj kaj prelegoj en Helsingör, Danlando, Frostavallen, Svedio kaj Lieĝo, Belgio. La katolikoj kunvenis en Como, Italio, kaj la protestantoj en Rocheton, Francio. Politikemuloj diskutis en Parizo uzante esperanton kaj mar-ŝatantoj ree feriis en Primoŝteno, Jugoslavio, inter multaj aliaj turistoj. Jen do la ĉefaj eŭropaj esperanto-renkontiĝoj.

Cl.- Ne estas necese memori al vi la Universalan Kongreson, kiu okazis en Portlando, en la ŝtato Oregono, Usono. Dank'al ĝi pluraj restadoj kaj kursoj disvolviĝis en Norda Ameriko. Ĉu iom post iom nia movado emancipiĝas de la troa eŭropa influo, tion ni esperas.

A.- Montriĝas, ke nova generacio iom post iom transprenas la organizadon de niaj kongresoj. Samtempe ili alportas novan sintenon. Ili ne plu povas kontentiĝi resti inter si, kiel tro ofte faris iliaj antaŭuloj.

Cl.- Sinjorino Ada Fighiera-Sikorska, la redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, raportas en artikolo titolita *Post la kongreso*, ke la organizantoj de la Universala Kongreso en Portland ne nur venkis la distancajn problemojn, sed ankaŭ faris ion, kion antaŭaj komitatoj ne sukcesis : ili organizis antaŭ- kaj post-kongresaj radiaj kursoj.

A.- Same en Kuopio la nova generacio sukcesis aŭdigi la voĉon de esperanto, kiel ne ofte okazis ĝis nun. Sinjoro Bartelmes, la redaktoro de *Sennaciulo*, raportas, ke dum la lasta jar-periodo la aktiva klubo de Kuopio « Lingvo-ponto » disdonis ĉirkaŭ 50 mil informilojn pri nia lingvo. Antaŭ kaj dum la kongreso aperis en la regiona gazetaro sesdeko da artikoloj kun fotoj, kaj la ĉefa gazeto malfermis ĉiutage dum la tuta kongreso rubrikon en esperanto kun la politikaj eventoj. Junaj artistoj lernis esperanton por prezenti teatraĵojn kaj muzikon.

Cl.- Kaj la prezidanto, kiu gvidis tiun agadon estas long-harulo nomata Pekka Virtanen. La mallong-haruloj komprenu, ke alvenis la momento pli kaj pli cedi la gvidilojn de la movado al tiu dinamika generacio, kiu kapablas alporti novajn kutimojn kaj ne plu povas kontentiĝi je la ĝisnunaj kutimoj. Ĉar estas necese antaŭvidi reformojn, se ni deziras favori la kreskadon de nia movado. Pri tiuj reformoj, kiuj fariĝas pli kaj pli dezirataj, raportas sinjorino Fighiera, koncerne al la Universala Kongreso. Ni citas ŝin :

A.- « *Se io malglata okazis dum la Kongreso, pri tio ne kulpas la organizantoj, sed la kadukaj strukturoj de la Kongreso. Jaron post jaro, kun kelkaj esceptoj, oni rimarkas la seninteresan karakteron de la ĝeneralaj kaj sekciaj kunvenoj, ignorante la dinamikon de la modernaj*

labor-metodoj. Post formala, teda raporto sekvas formala kaj teda diskuto.» Sinjorino Fighiera konkludas : « Necesas [...], ke niaj Universalaj Kongresoj liberiĝu de sia konservatismo. »

Cl.- Ni diros, ne nur la Universalaj Kongresoj, ĉiuj niaj kongresoj. Nur tiel ili povos ekludi rolon kaj ĉesi esti nura babilejo, kiu ne povas interesi fakulojn kaj junulojn.

A.- Laŭ la nombro de la partoprenintoj, la ĉefaj aranĝoj estis : la Universala Kongreso : pli ol 800 personoj el 40 landoj. Sekvis la Budapeŝta Kultura Festivalo kun proksimume 600 personoj el 20 landoj. La kongreso de SAT grupigis 330 personojn el 18 landoj. Sekvas poste multaj aranĝoj, kiuj grupigis po cent kaj ducent esperantistojn.

Cl.- Kvalite kelkaj aranĝoj estis tre malbonaj. Gesinjoroj Reinhard Haupenthal, kiujn ni renkontis en la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, raportis al ni pri alia universitata aranĝo : la 10-a Jubilea Somera Esperanto-Universitato, kiu disvolviĝis en Gyula, hungara vilaĝo. Estis pseŭdo-universitata aranĝo, kiu pli similis al ekspluatado de esperanto-viktimoj fare de turisma entrepreno, ol al kursaro. Ni devus multe pli forte kritiki en nia gazetaro tiujn fuŝ-aranĝojn, kiuj forpelas el nia movado la plej kompetentajn estontajn fortojn.

A.- Kontraŭe en Lieĝo la Universitataj Kursoj disvolviĝis en altnivela etoso. La venontan semajnon ni raportos pri tiu belega restado, kie ni ege riĉiĝis je novaj konoj kaj kontaktoj.

Cl.- Ni, eŭropanoj, devus kompreni, ke ni ne plu estas la umbiliko de la esperanto-movado. La organizantoj de la Universala Kongreso okazigis diskuton, kiu kritikis la samtempan organizadon, fare de UEA, de prelegaro en Frostavallen, kaj ili pravis. Kion ni dirus, se la usonanoj kaj la japanoj organizus altnivelan kongreson la saman semajnon, kiam disvolviĝas en Eŭropo la Universala Kongreso ? Verŝajne la grumblado de la amerikanoj portos fruktojn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!